

## **AVENO #39 - Homaj Rajtoj**

Januaro - Decembro 2013

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

### **Ligoj:**

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpago, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/>

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

2013-11-14 **Amazigh protestas por sia lingvo** - baras gas-dukton.

Tiu indighena popolo de la montaro en Algerio kaj Libio havas propran lingvon, kiu estas malpermesita. Pro tio ili baris la gas-dukton, kiu liveras ter-gason al Europo.

(Iau Mirco Keilberth, taz, 2013-11-14, p. 11)

2013-12-05 **Nelson Mandela mortis, granda visiulo kaj aktivulo por repacigo**

Li estis enkarcerigita entute dum 27-jara pro sia nelaciga senperforta batalo kontraŭ Apartheid kaj finfinfe sukcesis. Lia sistemo poste esplori la verecon de la okazajhoj ighis modelo por fini tiajn konfliktojn.

Li sekvis la modelon de Mahatma Gandhi, prononci justecon kontraŭ maljusta rasisma sistemo. Kompreneble li ne estis la sola kiu agadis en sia lando, sed li estis la koro kaj kerno de la movado.

Ne chio estas modela en Sudafriko nune, espereble la civitanoj en tiu lando trovos taugan kaj justan vojon.

Li restas en la eterna memoro pri la ekzemplo-donaj pozitivuloj de la mondo, same kiel Mahatma Gandhi, Martin Luther King, Wangari Maathai\*, Dalai Lamao, Albert Schweitzer, Karlo Markso, Galileo, Jesuo, Budho kaj pluraj aliaj.

Tutmonde intereson trovis la manpremo inter Barack Obama & Raoul Castro - bona komenco por re-normaligo inter la najbaroj Kubo kaj Usono.

(vidu ankaŭ [www.verduloj.org/homoj.htm](http://www.verduloj.org/homoj.htm))

\*) WANGARI MAATHAI ; Kiel la TRI aliaj herroj, ŝi suferis malamajn kampanjon fare de multaj amaskomunikiloj, batojn, procezojn, enkarcerigon, minacojn je morto, ktp, chio, pro siaj agadoj por protekti arbarojn, pro siaj semoj de 47 milionoj da arboj, sia energia partopreno en la liberigado de 52 junuloj, maljuste enkarcerigitaj kaj mistrakatataj, kaj fine por si forta partopreno en vere demokratio baloto, kiu anstataŭigis ferocan diktatoron per ekdemokratio. Libro de Wangari Maathai (aŭ belegaj porjunulaj albumoj pri ŝi) ekzistas en pluraj lingvoj ) Bonega novajho : la 80 minuta filmo pri ŝia vivo " TAKING ROOT" antaŭ nelonge estis duobligita en deko da lingvoj:

Spanish, Portuguese, Haitian Creole, and English (NTSC)

Kiswahili, Arabic, French and English (PAL)

Indonesian, Chinese, Russian and English (PAL)

Hindi, Bengali, Vietnamese and English

20xx-11-25 Internacia Tago por elimino de perforto kontraŭ virinoj:

(en la oficialaj lingvoj de la UN) <http://www.un.org/en/events/endviolenceday/>

(en Ipernity per Esperanto) <http://www.ipernity.com/doc/32119/28400881>

2013-11-20 **Rusio malhelpas CSO-ojn jam dum 1 jaro - Al protestas**

Amnestio Internacia protestas kontraŭ la „Agento-leghon“, kiun Rusio instalas antaŭ unu jaro.

Ghi ege malhelpas la laboron de la Civil-Sociaj Organizo per de kontrolado kaj minacado.

CSO-oj same kiel libera jhurnalismo, inkluzive de t.n. fajfo-blovado, estas la bazo de libera

socio, kaj bazo de jur-shtata regado de la shtatoj. Pro tio la germana grupo de Al skribis

peticion al la rusa prezidento Putin, por aboli tiun leghon:

<http://www.amnesty.de/agentengesetz>

Vi povas legi la gazetar-mesaghon de Al ankaŭ en aliaj lingvo, serchu „Russia“ (au simile):

<http://www.amnesty.org/en/for-media/press-releases/russia-year-putin-s-foreign-agents-law-choking-freedom-2013-11-20>

2013-10 La Tshwane-Principoj - problemo inter la rajtoj je informo kaj la sekureco de la shtatoj.

Ili estas difintiaj inter pluraj CSO/NRO-oj. Kaj la kazoj de Assange (Wikileaks) kaj Snowden

montras ke la shtatoj ege timas travideblecon.

Jen la teksto en la angla (serchu Tshwane):

<http://www.right2info.org/resources/publications/publications-1>

Havebla ankaŭ en la germana (40 paghoj), che la [www.kritischeaktionaere.de](http://www.kritischeaktionaere.de), kaj de AVE.

### 2013-10 chu **Kat-Amantoj havas propran finaĵon ?**

Jes, Katalunio havas la domeno-finaĵon ".cat". Tio aparte fierigas nin. Ni ne rajtas ricevi duliteran finaĵon por indiki landon (almenaŭ ne ankoraŭ) kaj pro tio kataluna grupo pri interreto laboris diskrete kaj rigore ĉe ICANN por akceptigi novan kategorion triliteran "kulturojn". Fine ICANN faris tian decidon kaj akceptis ".cat" kaj aliajn.

.cat disponeblas por retpaĝoj en la kataluna lingvo. La kataluna lingvo estas parolata en Katalunio, Valencio, Balearaj Insuloj (Majoroko, Minoroko, Ejviso), parto de Aragono, parto de Francio, Andoro kaj en la urbo Alĝero (Korsiko).

Por pravigi sian proponon, la kataluna grupo certigis, ke sufiĉe granda nombro de asocioj kaj insititucioj alprenos tian finaĵon, kio efektive okazis.

(de Ramon Perera)

### 2013-10-12 **Hispanaj fashistoj minacas en Barcelono**

Okaze de la rememoro ke Kolumbus albrondis en Ameriko, oni festas la „Tagon de la Hispaneco“ Certe estas granda sukceso de la revo de Kolumbus, ke li trovis (ech erarante) la ne-(plu) konatan kontinenton. Tamen estas dubinde, chu ankaŭ la indigenoj vidas tion, kiel festotago. Chiukaze en Barcelono la homoj satighis de hispaneco; ili preferas sian propran kulturon kaj lingvon - kaj memstarecon: jen raporto en germana maldekstra gazeto „Neues Deutschland“. (de) <http://www.neues-deutschland.de/artikel/835881.faschistenhorden-hetzten-in-barcelona.html?sstr=katalonien>

### 2013-03 **Europa Charto pri la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj**

Sur tiu Vikipedio en Esperanto vi trovas la bazajn informojn kaj la minoritatajn lingvojn en multaj/chiu EU-shtatoj. Kaj ankaŭ la ligan al tiu Charto.

[http://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa\\_%C4%88arto\\_pri\\_la\\_Regionaj\\_kaj\\_Minoritataj\\_Lingvoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_%C4%88arto_pri_la_Regionaj_kaj_Minoritataj_Lingvoj)

Kaj denove la ligan al la aktuala rezolucio de la EP (2013-09) en 24 lingvoj:

<http://www.europarl.europa.eu/sides/getDoc.do?pubRef=-//EP//TEXT+TA+P7-TA-2013-0350+0+DOC+XML+V0//DE>

**Tutmonde:** Certe tiu temo ankaŭ rilatas al aliaj federaciaj shtatoj au simple grandaj shtatoj, kie vivas minoritatoj.

### 2013-09-11 **Europa Parlamento por protekti la minoritatajn lingvojn** en Europo:

Temas pri Rezolucio pri aliaj lingvoj krom tiuj 24 oficialaj naciaj lingvoj en de la EU.

Temas nek pri lingvoj de migruloj, nek pri ia neutrala internacia lingvo kiel Esperanto.

Sed dank al niaj geamikoj en Francio kaj Catherine Gr`eze (MEP) oni almenaŭ diskutis pri Esperanto. Jam en la diskuto ene de la interfrakcia grupo la pli dekstraj partioj kontrauis ĝin, la socialistoj sindetenis - kaj subtenis ĝin nur la Verduloj/Regionalistoj kaj (?).

(la rezolucio en 24 lingvoj):

<http://www.europarl.europa.eu/sides/getDoc.do?pubRef=-//EP//TEXT+TA+P7-TA-2013-0350+0+DOC+XML+V0//DE>

### 2013-09-27 **OSKE plendas pri malpermeso en Hispanio:**

La suborganizajho de OSCE/OSKE (Organizo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Europo) - Oficejo pri Demokrataj Institucioj kaj Homaj Rajtoj (ODIHR), esprimis sian seniluziighon pro la malpermeso flanke de Hispanaj Aŭtoritatoj ke monitoroj rigardu la kontrau-monarhhian manifestacion en Madrido (je laSabato, la 28-an). (en) <http://www.osce.org/odihr/105973>

### 2013-09-27 **Hispanio - tauro-batalo kiel „ kulturo“**

Juan Manuel Albendea estas deputito de la dekstrisma partio Partido Popular kaj prezidanto la Komisiono pri Kulturo en Hispanio. Li proponis aprobi ke "los toros" (batala mortigado de tauroj en areno) estas aktivado kun kultura intereso. Tion subskribis 500.000 personoj en Hispanio.

Li asertas - la tria ne aperas en la skribita novajho, sed oni klare audas en la video.

- Tauroj sentas plezuron kiam estas mortigataj. (?)

- Se "los toros" malaperos, tiam malaperos parto de la hispana lingvo.

- Malpermesi la spektaklon "los toros" estas grava atenco kontrau la ekonomio.

Cetere, kaj tio estas la ĉefa kialo de tiu legho-propono, oni celas nuligi la leghon de la kataluna parlamento, kiu malpermesas "los toros" en la kataluna teritorio.

Jen la ligo al la novajho (en la kataluna) kun video (en la hispana).

<http://www.vilaweb.cat/noticia/4146493/20130927/diputat-pp-diu-toros-senten-plaer-quanten.html> (ambau laŭ informoj de Ramon Pereira)

2013-09 **Irano liberigas politikajn malliberulojn** & serĉas pacan kunlaboron.

La nova prezidento de Irano Ruhani montras tute alian bildon ol la antaŭa - evidente li ankaŭ konsento kun la religia superulo Khamenei. Lia parolado antaŭ la UN-sembleo estis bon-sona kaj ne agresema.

Ni esperas ke Irano preferas konflikto-solvadon pri la Sirio, Irako, Kurdaj regionoj, Palestino je rondaj tabloj. Kaj espereble Irano reduktas la atom-programon - kaj prefere uzos suno- kaj vento-energion.

2013-09 **Edward Snowden proponita por la Sakharov-premio de la EP**

La Verda-Regionalista Frakcio en la Europa Parlamento nomumis Edward Snowden por ricevi la Sakharov-Premion. Laŭ informo de Heide Rühle - ankoraŭ ne sur la retejo - serĉu: „Snowden“ <http://www.europeangreens.eu>

2013-08 **Bradley/Chelsea\* Mannings kondamnita al 35 jaroj**

Sed la pafistoj el helikopteroj - ili ghojas liberecon !

Por demokratio ne nur sufiĉas la divido de la 3 povoj (leghdonado, ekzekutivo, jughistaro) - krome necesas sendependa ĵurnalismo. Por ili necesas la t.n. fajfistoj, kiuj publikas kashitajn aferojn, kiel korputeco kaj krimojn faritaj flanke de la registaro kaj administracioj.

Ni danku al Edward Snowden , Chelsea/Bradley Manning, Julian Assange, multaj fajfistoj & al <http://www.WikiLeaks.org> .

Chelsea/Bradley Manning nun estas kondamnita al 35 jaroj en malliberejo; sed tiuj soldatoj kiuj chasis pacemajn homojn el helikoptero - ili eĉ ne devas klarigi siajn pafadojn antaŭ jughkortumo. Jen vi povas mem rigardi: <http://www.youtube.com/watch?v=GPTeyctjKb4>  
Kiu al kutimighas al maljusteco, tiu minacigas sian propran liberecon (eldiro de Axel Mayer, Endingen)

\*) Bradley sentas sin ino kaj ri ŝatus esti alparolata per sia nova, ina nomo Chelsea Manning. (en) <http://www.theguardian.com/world/2013/sep/25/chelsea-manning-diagnosis-hormonal-therapy> (dankon al Marteno Minihh pri la informo)

**Enkonduke por AVENO 2013-08-25 mi skribis:**

je tute hhaosaj situacioj aparte en Sirio kaj ankaŭ Egiptio ne eblas rezigni.

Krome fughas homoj: pro inundoj en orienta Azio (je la Amur-regiono kaj Manchurio), kaj pro nestabilaj situacioj en landoj de Afriko kaj Azio.

Por ni restas esperi, ke oni trovos taugajn solvojn por redukti la konfliktojn.

Kaj por ni restas labori, esti sana, kaj kelkfoje ghoji, se ni vivas sub pli agrablaj kondiĉoj.

2013-08-25 **Sirio: Kiu uzas kemiajn armilojn ?**

Estas malfacile decidi kiu mensogas (pli ?) en Sirio.

Chiukaze Assad komencis mortigadi manifestaciantojn - pro tio oni supozas, ke li mensogas chirilate. Fakte estas internacie malpermesite ŝpruci tiajn kemiajn armilojn (amasajn mortigilojn). Bedaŭrinde tiu situacio estas tute stranga, ĉar la internacia komunumo estas paralizita, pro la diversaj interesoj aparte de Rusio kaj Ĉinio; kaj la homoj suferas.

Necesus komuna decido de la Sekureco-Konsilio de UN por fini la internan militon en Sirio; kaj eble instali intertempa neutrala registaro flanke de UN. Mi revas tiudirekten.

1963-08 **Revon havas mi - la fama parolado de Martin Luther King :**

(Esperanto) <http://www.satesperanto.org/Revon-havas-mi.html>

2013-10-25 **MBX 10 jaroj en Putinaj malliberejoj**

Marie-Luise Beck (germana verdpertia parlamentano): MBKhodorkovsky protestas kontraŭ subpremanta rusia registaro; kaj

Lord Trimble (Nobel-Laureato kaj membro de la supra parlamento (HoL): misuzo de justico

Jen koncize pri la 10 jaroj de lia malliberigo: <http://decadeofinjustice.com/>

2013-December: li kaj pluraj aliaj politikaj malliberigitaj estis re-liberigitaj pro Amnestio - supozeble pro la Olimpikaj Ludoj en Soĉi.

2013-07-16 Kie totalismaj sistemoj funkcias, la homoj bezonas ŝercojn - mi audis la jenan: La maljuna Mohamad, kiu vivas en Usono skribas al sia filo "Estus bone se vi estus hejme, ĉar mi

devas plugi la ghardenon". La filo, kio vivas fore en granda urbo, respondas koncize "Pachjo, bedaŭrinde mi ne povos veni, sed ne plugu la ghardenon - mi kashis aferon tie".

La patro miras ... - Jam alitage venas policistoj kune kun laboristoj kiuj plugas la ghardenon, sed trovas nenion specialan. Post kelkaj tagoj la filo skribas denove: "chu bone, chu oni jam plugis?"

(intertempe E. Snowden atendas en Moskva flughaveno kie li povus ricevi asilon, ĉar li pri-fajfis la sekretajn servojn de Usono, kaj Britio)

2013-07-04 **Usono/Europo:** Dank al **Edward Snowden** ni ricevis informojn pri la monda-ampleksa spionado aparte flanke usonaj, sed ankaŭ britaj sekretaj servoj. Aparte post 9/11 (en 2001) Usono instalas plej altan kaj sekretan sekureco-sistemon. Sed tio ne konformas al amikecaj rilatoj kun aliaj ŝtatoj. Krome temas pri ekonomia pri-serĉado cele subtenado de la propra ekonomio.

Estas paradoksa situacio: unuflanke ni devus danki al tiaj fajfuloj, kiuj malfermas al ni la okulojn, kaj subtenas la transparencon; aliflanke ilia ago estas kontraŭ-legha, en la koncerna lando. Kelkaj europaj landoj baris hieraŭ la tra-flugon de sia tereno kontraŭ Evo Morales de Moskvo al Bolivio, pro kio lia aviadilo devis alteriĝi en Vieno; ĉar oni suspektis ke li kun-transportas Snowden. Pliaj detaloj ekz-e en Vikipedio

*Komento AVE/mw:* Eble oni devus havi novan artikolon en la Hom-Rajta Deklaracio kiu postulas **malkovri maljustajn agojn de sia registaro, au firmao**; kaj protektas la fajfulojn. Tio estus ankaŭ helpo kontraŭ la tutmonda korupcio.

2013-07-04 Egiptio: **Armeo puchas por re-komenci la demokratian vojon.**

Ĉar Mursi, la demokrate elektita, sed ne demokrate aganta prezidento de Egiptio ne sukcesis diskuti kun la aliaj partoj de la civitanoj, okazis multaj manifestacioj. Li eĉ ne sukcesis antaŭenigi la ekonomion de la lando. Do, ni esperas ke Egiptio retrovos stabilecon, ne la rigidan, sekret-polican de Mubarak, sed liberecan, sen korupcio, kie la povoj de la unuopuloj povas evolui.

**Similan ni esperas por Turkio** - interparoloj je Rondaj Tabloj.

2013-07-04 **Russia donacas amnestion al entreprenistoj** - sed ne al Mihhail Khodorkovsky. <http://www.khodorkovsky.com/featured-articles/mikhail-khodorkovsky-it-is-hard-to-imagine-the-possibility-of-release-ten-years-in-jail-is-no-laughing-matter/>

2013-06-28 **Komento de Jakvo pri simila pacema & silenta manifestacio:**

Antaŭ multaj jaroj, la juda komunumo havis kialon manifestacii. (mi forgesas pri kio rilatis) Ili iris brako en brako laŭ largheco de la strato, sen iu bruoj, sen sloganoj, sen flagoj kaj ĉiuj volas scii kial ili manifestacii. Je lasta parto de la manifestacio estis kelkaj homoj kiuj donis flugfoliojn al tiuj homoj kiuj petis ĝghin, sed nur al tiuj homoj. Estis la plej impona manifestacio kiun mi iam vidis kaj mi neniam forgesas ĝghin. amike jakvo

2013-06-18 **Homrajta Rigardado** kritikas la totalan **superrigardon en tibetaj vilaghoj**. la registaro de P.R.Chinio sendis pli ol 20.000 da oficistoj kaj kadruloj de la KPCh - laŭdire por plibonigi la kampanon vivon. Tio skvos en plia barado da libera eldiro pri opinioj kaj kritiko. Ghi similas al la „Blockwart“ en nazia Germanio.

<http://www.hrw.org/news/2013/06/18/china-benefit-masses-campaign-surveilling-tibetans>

2013-06-17 supozeble vi ĉiuj legis - au spektis en la TV - pri la aktualaj okazajhoj en Turkio, Sirio kaj Irano. Por sukcesplena gvidado da registaro kaj kunvivado necesas demokratio, kun la jenaj trajtoj:

**disdivido la povo en sendependaj unuoj,**

a tri malnovaj kiujn ni heredis de la franca revolucio: Leghdonado, Justico, Ekzekutivo & adicie la pli novaj:

libera aliro al informoj, amaskomunikiloj kiuj neniel dependas de la povuloj, libera esprimo da opinioj (kun rimedoj sin-defendi kontraŭ malghustaj suspektoj), institucio kiu akceptas kaj postsekvas plendojn de civitanoj pro korupcio kaj maljusta agado de aŭtoritatoj.

Bona edukado estas kondiĉo por ke tiuj eblecoj povas funkcii.

Bondezirojn, amike, manfred

2013-06 La registaro de **Erdogan en Turkio** opinias, ke ili ne bezonas paroli kun la movado kiu postulas pli da kun-parolo (jam ne plu temas sole pri la Gezi-parko en Istambulo). Sed la registaro batalas kruele per sufokiga ŝprucado kontraŭ siaj civitanoj anstataŭ paroli kun ili.

Tiaj registaroj estas ne-eltenebraj, kaj ne longe sin-tenos je la povo.

2013-06-16 **Irano elektis pli moderan novan prezidenton. Gratulon** - kaj esperon, ke vere li volas kaj povas kion li diris.  
simila situacio kiel post je la elekto de Khatami 1997 - sed tiu poste ne tute plenumis la atenditajn plibonigojn.

2013-06 La usona prezidento Obama diris, ke nun ekzistas pruvoj ke la registaro de **Sirio uzis kemian armilon (Sarin)**, kiu ne nur mortigas, sed ankaŭ sane kripligas homojn, kio signifus transiron de t.n. Rugha Linio. Antaŭe estis ne-klare, kiu jhetis la Sarin-bombojn.  
Tiaj armiloj estas delonge internacie malpermesitaj, simile kiel la amase sternataj eksplodiloj - sed ne chiuj registaroj respektas tion.  
Usono nun subtenas la ribelulojn, dum Rusio ankoraŭ liveras armilojn al la buchisto Assad. La longdaŭra profito por Rusio estus pli granda, se ghi akceptus, ke tia registaro kiu mortpafas - komence paceme manifestaciantajn civitanojn - ne plu eblas. Espereble la rusa registaro baldaŭ shanghas sian opinionon.

2013-06 **Hindio mankas virinoj - kial - ĉar oni mortigas ilin ?**

Ek de la perversa seksperforta mortigo de juna virino lastan autunon oni audas pli ofte pri tiaj kruelajhoj.

Evidente la ghendra politiko en Hindio ankoraŭ estas arhhaika. Krom multaj elstaraj virinoj - la plejmulto de ili estas subpremata. Bebinoj estas ofte mortigitaj, au mortas pro malnutrigho; pro tio jam mankas virinoj statistike. La komprenebla kauzo estas la geezigho-regulo, ke la fianchino devas kunporti multe da mono; kio aparte en kazo de malrichaj familioj - kiuj tre oftas - kausas pli fortan malrichecon. En la pejzaghaj regionoj ankaŭ la posedo de tereno estas tre mal-egala; grand-bienuloj misuzas siajn povojn. Sed ankaŭ la malegaleco en la normala vivo, kie la familio ne manghas kune, sed la edzino kaj inaj infanoj devas atendi ghis la edzo venas, kaj finmanghas; nur poste estas dece por ili manghi. Knaboj havas chiajn eblecojn, sed knabinoj devas hejme labori.

Do, produkti atombombon, rakedojn, automobilojn kaj softvaron ne sufichas por evolui landon. Ghenerale: la sociala, do financa distanco inter la plej malricha grupo kaj la plej richa montras, chu lando vivas en socia(la) harmonio - au ne. Kaj estas la devo de politikistoj subteni la egalecon.

Pozitiva kontrasto estas **Bhutan**, kie la regho kaj registaro celas altigi la viv-felichon de la tuta popolo; kaj rifuzas nur finance-bazitajn indekso-nombrojn.  
(lau Georg Blume, taz 2013-06-08, p.4-5)

2013-06-01 **Blockupy blokita en Frankfurt/Bankfurt**

Ankaŭ en Germanio la aŭtoritatoj ofte ne respektas la homajn rajtojn: kutime je rifughintoj, kaj en Hes-lando ili ghenis paceman manifestacion „Blockupy“, kiu protestis kontraŭ la favorado de bankoj, ankaŭ de la europa EZB, kontraŭe al la bezonoj de normalaj homoj.  
Ne la unuan fojon (en Germanio) la polico - en CDU-lando - baris kvazau en kaghon ch. 900 manifestaciantojn dum ch. 5 horoj, kio estas rabado de la libereco. La policanoj ne portis nomshildojn sed maskojn, tiel ili ne povas esti rekonataj - kaj akuzataj.

2013-06 **Turkio - Taksim-placo protekto de la Gazi-Parko**

La parko de jaro al jaro ighis malpli granda; la nunaj planoj konstrui tie magazenon por aĉeti vekis protestojn. Sed la registaro batalis kontraŭ la protestantoj. Pro tio okazis manifestacioj en multaj urboj.

La registaro ne emas vere diskuti kun la popolo. Erdogan jam estas nomumita „sultano“; sed intertempe Turkio estas moderna lando - la interreto informas. Bedaurinde la plejmulto de la gazetaro fermas siajn okulojn.

(lau komento en taz 2013-06-08, p. 06; kaj en DLF-radio, 2013-06-08, 17:15)

2013-05-07 **Mortpuno en Usono, ....**

La Supera Jughkortumo de Mississippi, Usono, finfine akceptis la petojn ne ekzekuti Willi Manning, sed unue DNA-testi la specimenojn. Do, **dankon al chiuj kiuj subtenis lin per subskribo**. En la lastaj jaroj pluraj usonaj provincoj abdikis la mortpunon; aparte ĉar plurfoje montrighis - ankaŭ dank la DNA-testado - ke kondamnitaj estas ne kulpaj.

<http://www.innocenceproject.org/>

<http://www.ncadp.org>

Bedaurinde en multaj landoj ankoraŭ okazas ekzekutoj: Japanio, Chinio, ktp. La alia metodo ekzekuti homojn estas pseudo-milito, **mortpafi eble dangherajn homojn el fore**; ekz-e el

sen-homaj aviadiloj (germane: **Drohne, angle: UAV**). Tio estas kontrau-legha ekster la milito. Ofte estas trafitaj tute sen-kulpaj homoj.

#### 2013-04-06 **Bangladesh minacas ateismajn blogistojn.**

Jes, ankau ne-kredi au kredi diversmaniere al (iu) Dio apartenas al la Homaj Rajtoj, rajto kiu en kelkaj landoj estas ne obeata. Mi jhus audis ke en Bangladesho ateismaj blogistoj estas minacataj al mortpuno.

(lau elsendo de Dradio.de "Deutschlandfunk")

Fakte la shangho de religio, nuntempe de Islamo al Kristanismo au al Bahaismo - malgrau tio, ke temas pri la sama ideo je Dio - en kelkaj landoj estas rigardata krimo, punenda per mortigo. (sed tute ne puninda)

2013 **Homaj Rajtoj 3000** inform-agadas por indighenaj popoloj kaj etnoj endangherigataj pro registaroj, kaj pro la ekspluatado da resursoj (uranio, nafto, erco, arbaroj). La organiza retejo estas en la germana, sed la ligoj „Links“ gvidas al tre variaj, parte ne-tro-konataj CSO-oj (civil-sociaj organizoj): <http://www.menschenrechte3000.org>

2013-04 **Amnestio Internacia** subtenas individuojn kiuj estas subpremataj de autoritatoj: jen ekzemploj en Rusio:

Igor Kaljapin, estrarano de IRCAT kiu agadas kontrau torturo kaj mis-traktado, sed estas tre minacata de la autoritatoj. Bonvolu subteni la peticion de AI (en la germana kaj angla):

<http://www.amnesty.de/igor-kaljapin>

La ghererala pagharo (angla, araba, hispana, franca) kun la ebleco elekti iun ajn landon kaj temon trovighas je: <http://www.amnesty.org>

AI ankau postulas liberigi la prizonulojn **M. Khodorkovsy kaj P. Lebedev**, kiuj pro politikaj kauzoj trovighas en malliberejo jam la duan periodon. Formale pro impost-fraudo rilate al la nafto-konzernon Jukos, kiu estis neniigita - evidente lau postulo de Putin. La firmaoj de Jukos nun plejparte trovighas en Rosneft.

(de, en) [http://action.amnesty.de//ger/p/dia/action/public/?action\\_KEY=9173&d=1](http://action.amnesty.de//ger/p/dia/action/public/?action_KEY=9173&d=1)

Aparte alparolitaj estas germanoj, char chijare Rusio ludas gravan rolon de gast-lando en la tutmonda foirejo Hannover-Messe.

2013-03 APC raportis pri UNESKO-konferenco en Bogota pri „**Informaj socioj por paco kaj daurigebla evoluo**“: <http://www.apc.org/en/node/17105>

2013-03 Tre interesaj informoj el la alia Flanko - pri Israelo kaj Palesteno  
<http://othersite.org>

#### 2008 **Lingvaj efikoj de la lingva malegaleco en la Europa Unio**

Studo de Aron Lukacs - dokumentita en pluraj lingvoj, kune kun la respondo de la tiama komisaro Orban, kiu fakte lasis chion eble: <http://ekolingvo.com/>

al tiu kvazau respondis .....

2013: Deklaro de Joshka Fischer (germana verdula eks-politikisto)

Se oni sincere volas konstrui **komunan estontan Euxropon**, cxiu devas iom cedi, pensante pri estonto kion ni povus kune elprofiti. Cxi tie temas ne nur pri politikaj, ekonomiaj, kulturaj batalkampoj, sed same pri **vera integrigxo de popoloj, kiu neniam povas esti atingita per nacia(j) lingvo(j)**. De historio ni povas esti instruitaj, ke la franco neniam konsentos gxenerale akcepti la anglan, la germano la francan, italiano neniam la germanan, polo neniam rusan cxu germanan k.t.p...

Intertempe niaj idoj estos devigotaj lerni la cxinan, se ni ne cedos de gxisnunan lingvan praktikadon.

Mi esperas, ke en Euxropo trovigxos respondecaj personoj, kiuj tiun problemon sincere komprenos kaj revolucios.

Felicxe, jam nun oni auxdigxas pli da prudenteco en tiu direkto.

(dank' al informo de G-K Rinaldo, EU-federo@googlegroups.com )

#### 2013-01-13 **Rusio perdis advokaton por la Homaj Rajtoj: Juri Shmit**

Li defendis i.a. la komandanton Nikitin, kiu malkovris la minacoj de la atomara postrestajhoj en la Norda Maro, kaj Mikaelon Khodorkovsky, miljardulo kiu subtenis la evoluon al malferma socio kaj subtenis la agadon por homeca konduto kontrau maljunuloj kaj orfoj en la richega Rusio.

(en, ru): <http://www.khodorkovsky.com/>